

PENSEO

N-ro 248

Jun. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)




Vojaĝbildetoj

Fervoja historieto

Mi konatiĝis kun fraŭlin'
entrajne.
Ni reciproke ŝatis nin.
Verŝajne,
bonŝancis inter ni amer'
trafulmi,
Ĉe l'takta bru' de "chemin de fer"
ŝi kun mi
babilis, kaj parola ĉarm'
de ŝia
voĉet' sincera tentis, ĉar
ebria
sen vin' pro l' tuja enamiĝ'
banala
mi estis. Lulis min feliĉ',
kaj al la
fraŭlinjo eĉ kantetis mi
ĝojplene.
Kisetis mian vangon ŝi
alvene,
kaj malaperis kun valiz'
en tramo.
Dirinte nur: "Avoĉjo, ĝi-is!"
Eĥ, amo...

08.01.2012



Kvin hajkoj ĉe la Norda maro

La maro Norda.
Pro vervo venta
harar' senorda.

Senhoma strando
en januaro –
la mondorando.

Marŝaŭmo bolas.
Ĉe l' kaldronego
mi unusolas.

Mevaron flanken
ventego pelas -
la nubon blankan.

La kupra reĝo
ĉeborde frostas
sub meva neĝo.

12.01.2012

Antverpena posttagmezo

Festenis vent' inter butikoj,
amaso celis subtegmenten,
kaj fulmo-sparkoj fantastikaj
en pluv' inokuliĝis venten.

De l' reklamiloj lum' neona
indiferente kolorigis
pluverojn, kaj nenio bona
min kun ĉi urbo, ŝajne, ligis.

Mi vagis vante kaj revante
pri l' varm' de eta kafotaso,
kaj gapis ĉien, evitante
interpuŝadon de l' amaso,

malsekiĝinte kaj senprede,
sur la pavim' stumblanta glite,
ĉe ekkrepusko ĉi vendrede
esperon perdis, sed subite

kvazaŭ signante dian benon,
por mi, post vica fulmo-sparko,
despere grizan Antverpenon
florigis pala ĉielarko.

13.01.2012

Anteo (Ĉinujo)



riĉulo kaj malriĉulo



riĉa knabino kun siaj bonzo-korpopogardistoj en
superbazaro



malriĉa knabineto kun sia frato en klasĉambro

sub la sama ĉielo,
en la sama epoko.
knabino ĝuas gardon de bonzoj
vizitante superbazon;
ili ne komprenas kia estas ŝia korpo.
knabineto sian fraton flegas
aŭskultante lecionon;
li ne scias kiu estas lia panjo.
...
ŝi abele lernas
oceanografion por onte pli ŝafe
zorgi pri ŝiaj infanoj orfiŝaj.
tio estas fera leĝo kaj destino ŝtona.

egaleco kaj justeco
skribiĝas en la lernolibro.
ŝiaj gepatroj propravole
al ŝiaj gepatroj dediĉas
siajn sangon kaj ŝvitojn.
kaj ŝi certe volontos akcepti
ŝian ĉevalselektan dungon en la domo
kiun konstruas kiel bovoj herbomanĝaj sed
senkredaj
ŝiaj gepatroj fore de siaj infanoj
por ŝiaj gepatroj kredantaj pie je budhismo
kvankam vorantaj ostojn.

Mori (Usono)



HUNDO

Hundojn, kiuj kun knabinoj
surstrate promenas
mi tre ŝatas!
Ofte mi haltas
kaj mi demandas
pri ĝia nomo
kaj ĝia aĝo
kaj ĝia raso.
Ni pluparolas
pri la vetero
kaj la cetero...
pri politiko
kaj la milito
kaj Prezidento;
la idioto!

Telefonnumerojn
ni interŝanĝas
kaj rendezuon
tuj ni aranĝas.

*

Hundojn, kiuj kun knabinoj
surstrate promenas
mi tre ŝatas.




Leieladonna (Meksikio)



EL ĈIUJ KOLOROJ ESTAS LA NOKTO

El tutaj koloroj estas la nokto...
 tiu ĉi nokto kiu ankaŭ atendas...
 sed matene kaj vespere
 ankaŭ atendas...
 ĉar kvar jaroj antaŭe estis diferenca
 ĝoja, prospera, kun espero...
 Ĉi tie, kvar jaroj antaŭe...
 la urbo neniam dormis ,
 sed nun ni atendas por esti
 la sama, feliĉa, prospera kaj paca
 la gastama aŭ favorkora
 sed ankoraŭ la ombroj reĝas...
 Tamen mi scias...
 ke jam baldaŭ venos la lumo
 Kaj mi eĉ jam dankas al Dio
 ĉar mi scias ke ni reprenos denove
 tiujn valorojn kiujn kelkaj el ni forgesis.



Paŭlo Silas (Brazilo)



KION VIDIS KAJ AŬSKULTIS LA SUNO

La multepoka Lum-Astro,
 En kosma spac', okulfiksante...
 Ĝi alrigardis la Teron,
 De homamas' amasmizeron.

Progres-Homar' naturtrompante —
 Vivdiverseca' utopia —
 Kaj, sur altar', oferdonante
 Protektopenson fikcian.

Eksterplanedaj okuloj,
 Nin ne hontigas via varma vidado:
 La fabrikuraj gasvualoj vin kovros...

Ĉu pri modernaj kulturoj?
 Ne... Vi, pri tiu tem', nenion diraĉos,
 Nin plipotencaj, post jarmiloj, vi
 trovos...

Cezar (Germanujo)



ELIRVOJO

Mi , kiu perdis la vojon,
 ne plu scias,
 kiun vojon mi iru.

Mi iras, sed mi jam ne scias,
 kial mi iras plu sur tiu vojo.

Mi iras, sed mi ne plu scias,
 kien?

Mi iras,
 sed mi perdis jam la esperon,
 ke tiu vojo kondukos min al celo.

Mi iras plu, sur tiu
 jam tro ofte uzita vojo.

Mi iras, sed mi ja jam scias,
 ke ankaŭ tiu vojo,
 kiu iam estis mia celo,
 ne kondukos min al celo.

Mi iras plu,
 tute mekanike,
 pro certa malkuraĝeco,
 sed mi nun cerbumas obstine pri tio,

kiun vojon mi efektive iru.

Mi iras plu,
sed mi trovos
kiel ĉiam -
nur novan elirvojon.




Benjamenno KRAŬS (Usono)



Ju pli...

Ju pli oni aĝas,
des pli gepatroj saĝas
kaj des pli oni memoras
kiel ili tre laboris
nur por oni, nur por oni,
ĉiutage, telefone,
ŝvitemege en ofico
por onia benefico.

Lenke Szász (Rumanujo)



GARDINTA AMO

Kiam la amo estas forta,
La homo sentas sin senmorta.
Ne povas tuŝi lin malbono,
Gardata sentas sin la homo.

Sed velkas eĉ la bela floro,
Ne pompadas eterne rozo.
Kiam la homo maljuniĝas,
Gardinta amo lin evitas.



Amadeu do Vale

Dolĉa Lisbono

De longe dolĉas Lisbono
Kun sia ĉarmo sen fin'
Kun sia gastamo rara
Kaj histori' tiel kara
Blanka vual' de saŭdado
Vian vizaĝon belkovras, princin'

Jen por ni savu Lisbon' en pasinteca vesto
Taŭrbatal' estis festo kun pompo reĝa, ho ĝu'!
La svarm' de tre populara procesi'
Maten' bazara, ve ĉi gaja bru' nun estas
forvanu'...

Pixinguinha

Karesulo

Apenaŭ vi pasas la kor'
en mia brust' jen sen kontrol' .
Miaj okuloj laŭstrate iras
post vi senlace, nur por vi brilas
sed tion ĉi ne vidas vi.

.
Ha se nur vi scius kiom karesema estas mi,
kaj kiom mi vin ŝatas.
Kial senkompatas vi pri mia granda am',
mi scias ke vi ne plu fuĝus for de mi.

.
Jes nur por vi
pulsas je plena flam'
ĉi mia kor',
ni ne perdiĝu for!

.
Venu tuj, ve ĉi pasi'
jam min mortigas pli kaj pli,
kaj do se venos vi feliĉo estos por ni.

Esperantigis



Ŭel (Brazilo)

Joahim ringelnac*



Nu tio al ni okazis

(1933)

Nu tio al ni okazis.

Tion ne forgesu kiam tempoj boniĝos !-
Sed kantas la birdar' kaj kantis,
Kaj estu senlime vasta via kor'.

Tion ne forgesu ! Nur por lerni
Pri tiu enigmo stranga : „sorto“ . –
Kial povas oni, ju pli for la staro,
Des pli amplekse vidi ?

Morto fiere paradmarŝas.
Tamen morti estas tempoperdo. –
En la brusto al vi estas koro,
Ĝin perdi vi ne rajtas.

**Joachim Ringelnatz estis germana poeto .*

1933 estas la jaro kiam Hitlero prenis la povon.

Esperantigis



Roland Platteau

(Francujo)

Wisława Szymborska (1923-2012)



ADOLESKULINO

Mi - adoleskulino?

Se abrupte, nun, ŝi aperus antaŭ mi,
ĉu mi devus saluti, kiel iun proksiman,
malgraŭ ke por mi ŝi fremdas kaj lontanas?

Verŝi unu larmon, ekkisi la frunton
pro unika kaŭzo,
ke nia naskiĝ-dato estas tute sama?

Tiom da nesimilecoj inter ni,
ke eble nur la ostoj estas samaj,
krani-volbo kaj okul-orbitoj.

Nu, ŝiaj okuloj ŝajnas pli grandaj,
okulharoj pli longaj, pli alta staturato
kaj la korpo tuta strikte vestita
per haŭto glata, sendifekta.

Nin ligas komunaj parencoj kaj konatoj,
Sed el tiu komuna rondo,
en ŝia mondo preskaŭ ĉiuj vivas,
kaj en mia preskaŭ neniu.

Tiel multe ni diversas,
pri tutaliaj aĵoj ni pensas, parolas.
Ŝi scias ete –
Sed kun obstino inda pli bonan aferon.
Mi scias multe pli -
sed ne tute certe.

Ŝi montras al mi versaĵojn,
skribitaj per skribo zorga, klara,
kiel mi jam de jaroj ne skribas.

Mi legas ĉi versaĵojn, legas.
Nu, eble ĉi, unika
se oni ĝin kurtigus
kaj korektus kelkloke.
La cetero nenion bonan promesas.

La konversacio ne fluas.
Sur ŝia modesta horloĝo
la tempo malcertas kaj ĉipas.
Sur la mia kostas pli kaj precizas.

Je adiaŭo - laŭokaza rideto
sen iu ajn kortuŝo.

Nur kiam ŝi malaperas
kaj forgesas pro hasto propran skarpon.

La skarpo el pura lano,

kun buntaj strioj
trikita por ŝi per kroĉilo
far nia patrino .

Mi ankoraŭ ĝin konservas.

Esperantigis



Helena Tylipska (Italujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Saluton al panjo

okaze de Patrino Tago 2012

—laŭ ĉineska skemo Qinyuanchun*

l' amo daŭras
de naskiĝo
ĝis vivofin'
ĝi elfluas de
bonfavora
altruisma
patrina sin'
zorgema fleg'
anĝela sent'
de la grandanima in'
tenere
tre delikate
envolas min

amon de la patrin'
mi vere
sentas kun inklin'
al gravuriĝo
en la koro
ŝi persistis
jen kun obstin'
min protekti

min subteni
per viviga vitamin'
dankon, panj'!
mi vin salutas
kun kapo-klin'

**Qinyuanchun (Printempo en la ĝardeno Qin): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x = senrima)*



Fasko da Ĉinesko Heyebai

Heyebai (Lotusfolia Taso): ĉina fiksfirma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb

Viktoro (Ĉinujo)

Nimfeo

nimfeo trankvila
brila
de roso
kuŝas sur akvo klara
kara
sen floso



Lavenda kampo

el maro purpura
pura
odoro
logas abelojn tire

mire
al floro

Cindy Mckee (Usono)



Nebula vidaĵo

Apenaŭa strigo,
tigo
kaj fono,
premvolitaj per grizo.
Skizo
en ŝtono.

Josep V. (Katalunio)

Post briko

olda magazeno
eno
post briko
hejmeniras lantpaŝe
kaŝe
heliko

Lily (Ĉinujo)

Eroto

eroto la sponta
fonta
de amo
fermentas jen fervore
vore
sen flamo

Veĵdo (Ĉinujo)

Mevo

per aera levo
mevo
leĝere

flugas post ŝtorm' detrua
brua
ja vere

Yanke (Ĉinujo)

Herbo

en ventego trema
ĝema
perpleksas
ĝi, sed vere obstine
pine
ne fleksas

Yanke (Ĉinujo)

Ĝojo de herbo

—laŭ ĉineska skemo Pozhenzi*

Ĝi skuas la kapon
en friska zefiro
pli malpli rapideme
por poeta inspiro
jen per admiro.

Ĝi etendas kolon
en kreska eltiro
kun june hela verdo
sen ajna kota ŝmiro.
Ha, kia spiro!

**Pozhenzi (kavalira danco): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)*

Maupassant (1850-1893)



LA PATRINO AL LA MONSTROJ

Mi memoris tiun hororan historion, kaj
tiun hororan virinon, vidante antaŭ kelkaj
tagoj pasi sur plaĝo ŝatata de la riĉuloj,

konatan Parizaninon, junan, elegantan, ĉarman, adoratan kaj respektatan de ĉiuj.

Mia historio datiĝas jam de longe, sed oni ne forgesis tiujn okazaĵojn.

Amiko invitis min restadi dum kelka tempo en sia hejmo, en provinca urbeto. Por fari al mi la honorojn de la regiono, li promenigis min ĉie, vidigis al mi la laŭdatajn pejzaĝojn, la kastelojn, la industriojn, la ruinŝtonojn, li montris al mi la monumentojn, la preĝejojn, la malnovajn skulptitajn pordojn, arbojn de impona dimensio aŭ stranga formo, la kverkon de Sankta Andreo, kaj la taksuson de Roqueboise [Rokbŭaz'].

Post kiam mi ekzamenis, kun ekkrioj de bonvola entuziasmo, ĉiujn vidindaĵojn de la regiono, mia amiko deklaris al mi, kun afliktata vizaĝo, ke ne plu estis io por viziti. Mi ekspiris. Mi do tuj povos iom ripozi, sub la ombro de la arboj. Sed subite il ekkriis:

– Ha, jes ja! Ni havas la patrinon al la monstroj, necesas, ke mi konigu ŝin al vi.

Mi demandis:

– Kiu? La patrino al la monstroj, ĉu?

Li reparolis:

– Ŝi estas abomeninda virino, vera demono, estaĵo kiu ĉiujare naskas, memvole, kriplajn, forpuŝe malbelajn, timigajn infanojn, fine monstrojn, kaj kiu vendas ilin al la montristoj de fenomenuloj.

De tempo al tempo, tiuj mallogaj industriistoj venas informiĝi, por scii ĉu ŝi ne naskis kelkan novan abortulon, kaj kiam la estaĵo plaĉas al ili, tiam ili kunprenas ĝin, pagante renton al la patrino.

Ŝi havas dek unu idojn el tiu specio. Ŝi estas riĉa.

Vi kredas, ke mi serĉas, ke mi inventas, ke mi troigas. Tute ne, mia amiko. Mi rakontas al vi nur la verecon, la ekzaktan verecon.

Ni iru vidi tiun virinon. Poste mi diros al vi, kiel ŝi fariĝis fabriko de monstroj.

Li forkondukis min al la ĉirkaŭurbo.

Ŝi loĝis en beleta malgranda domo

surborde de la vojo. Tio estis plaĉema, kaj bone prizorgadita. La ĝardeno, plena da floroj, bonodoris. Oni kredintus la loĝejon de notario ekŝiĝinta de la aferoj.

Servistino enirigis nin en specon de malgranda kampara salono, kaj la indignindulino aperis.

Ŝi aĝis ĉirkaŭ kvardek jarojn. Ŝi estis granda ulino, kun la trajtoj malmildaj, sed ŝi estis belkorpa virino, vigla kaj sana, la vera tipo de la fortika kampulino, duon-krudulino kaj duon-virino.

Ŝi konis la malaprobon, kiu trafis ŝin, kaj ŝajnis akcepti la vizitantojn nur kun malama humileco.

Ŝi demandis:

– Kion deziras tiuj sinjoroj?

Mia amiko diris:

– Oni diris al mi, ke via lasta etulo estis formita kiel ĉiuj infanoj, ke li tute ne similis al siaj fratoj. Mi volis certiĝi pri tio. Ĉu tio estas vera?

Ŝi ĵetis al ni furiozan kaj insideman rigardon, kaj respondis:

– Ho ne! Ho ne! mia povra sinjoro. Li estas eble ankoraŭ pli malbela ol la aliaj. Mi ne havas ŝancon, ne ŝancon. Ĉiuj estas samaj, mia brava sinjoro, ĉiuj samaj, estas afliktado, ĉu tio eblas, ke la bona Dio estu tiom malmolkora kun kompatinda virino, tute sola en la mondo, ĉu eble?

Ŝi rapide parolis, kun la kapo al la tero, kaj hipokrita mieno, simila al kruela besto kiu timas. Ŝi mildigis la akran tonon de sia voĉo, kaj ni miris, pro ke tiuj larmemaj paroloj, elfluigataj per kapvoĉo, eligis el tiu granda osta korpo, tro forta, kun maldelikataj anguloj, kiu ŝajnis farita por la impetegaj gestoj, kaj por hurli kiel la lupoj.

Mia amiko demandis:

– Ni volus vidi vian etulon.

Ŝi ŝajnis al mi ruĝiĝi. Sed eble mi eraris! Post, ke ŝi silentis dum momenteto, ŝi prononcis per pli laŭta voĉo:

– Pri kio, tio utilis al vi?

Nun ŝi restarigis la kapon, kaj vizaĝesploris nin per abruptaj ekrigardoj, en kiuj ni vidis fajron.

Mia akompananto reparolis:

– Kial vi ne volas vidigi lin al ni? Ja estas uloj, al kiuj vi montras lin. Vi ja scias pri kiuj mi parolas!

Ŝi eksaltis, kaj malbridante ŝian voĉon, ne mastrante sian koleron, ŝi kriis:

– Estas por tio, ke vi venis, nu diru! Por insulti min, ĉu ne? Ĉar miaj infanoj estas kiel bestoj, nu diru! Vi ne vidis lin, ne kaj ne, vi ne vidis lin; foriru, foriru. Ĉu mi scias, kial ĉiuj tiamaniere superŝutas min per insultoj?

Ŝi antaŭeniris al ni, kun la manoj sur la koksoj. Pro la kruda sono de ŝia voĉo, speco de ĝemado aŭ plivole ia miaŭado, lamenta krio de idioto eligis el la najbara ĉambro. Pro tio mi tremetis ĝis la medoloj. Antaŭ ŝi ni retropaŝis.

Mia amiko prononcis per severa tono:

– Atentu al vi, la Diablino (la popolo nomis ŝin la Diablino), atentu al vi, iun tagon aŭ alian, tio malbonŝancigos al vi.

Ŝi ekstremis pro furiozo, moviĝante siajn pugnojn, skuata, hurlante:

– Foriru do! Kio do malbonŝancigos al mi? Foriru! aro da malpiuloj!

Ŝi estis saltonta al niaj gorĝoj. Mia amiko kaj mi fuĝis, kun la koro kuntirita.

Kiam ni troviĝis antaŭ la pordo, mia amiko demandis al mi:

– Nu! Vi vidis ŝin! Kion vi diras pri ŝi?

Mi respondis:

– Sciigu do al mi la historion de tiu krudulino.

Kaj jen, kion li rakontis al mi, dum ni malrapidpaŝe revenis sur la granda blanka vojo, kiu estis borderita de maturaj rikoltaĵoj, kiujn leĝera vento, trapasante per blovoj, ondigadis kiel kvietan maron.

Antaŭe tiu knabino estis servistino en farmbieno, kuraĝa, bonkondata kaj ŝparema.

Oni ne konas al ŝi amsopiranton, oni tute ne suspektis malvirton pri ŝi.

Ŝi malĉastis, kiel faras ĉiuj farmservistinoj, okaze de vespero de rikoltado, meze de la falĉitaj garboj, sub fulmotondra ĉielo, dum la prema kaj senmova aero ŝajnas plenigata per varmo de forno, kaj trasorbegas de ŝvito la brunajn korpojn de la geknaboj.

Baldaŭ ŝi sentis sin graveda, kaj turmentiĝis pro honto kaj timo. Volante ĉiapreze kaŝi sian malbenon, ŝi violente premis al ŝi la ventron per sistemo, kiun ŝi inventis, iu perforta korseto, farita per tabuletoj kaj ŝnuroj. Ju pli ŝia flanko ŝveliĝis pro la puŝo de la grandiganta infano, des pli ŝi streĉis la torturilon, ŝi suferegis, sed kuraĝa al la doloro, ŝi restis ĉiam ridetanta kaj fleksebla, nenion lasante vidi aŭ suspekti.

Ŝi kripligis, en sia utero, la etulon stringitan per la terura maŝino; ŝi kunpremis lin, misformis lin, faris de li monstron. Lia premita kranio longiĝis, elŝprucis en formo de pinto kun du dikaj okuloj ekstere, tute elirantaj de la frunto. La membroj premataj kontraŭ la korpo kreskis, torditaj kiel la ligno de la vitoj, longiĝis ekscese, finiĝantaj per fingroj, kiuj similis al kruroj de araneo.

La torso restis tute malgranda kaj ronda kiel juglando.

Ŝi akuŝis plenkampare dum mateno printempe.

Kiam la sarkistinoj, kiuj estis alkurintaj por helpi al ŝi, ekvidis la beston, kiu eliris el ŝia korpo, ili forkuris eligante kriojn. Kaj en la regiono, la bruo ke ŝi naskis demonon disvatiĝis. Estas de tiu tempo, ke oni nomas ŝin "la Diablino".

Ŝi estis forpelita de sia posteno. Ŝi vivis dank'al almozpetado, kaj eble dank'al kaŝita amoro, ĉar ŝi estis bela knabino, kaj ĉiuj viroj ne timas inferon.

Ŝi edukis sian monstron, kiun ŝi cetere abomenis per sovaĝa malamo, kaj eble ŝi strangolus ĝin, se la parokestro, antaŭvidante

la krimon, ne timigus ŝin per la minaco de la justico.

Nu, iam, montristoj de fenomenuloj, kiuj trapasis la vilaĝon, aŭdis paroli pri la timiga abortulo, kaj demandis vidi ĝin, por kunporti ĝin, se ĝi plaĉus al ili. Ĝi plaĉis al ili, kaj ili kontante donis kvincent frankojn al la patrino. Ŝi, kiu unue hontis, kaj rifuzis lasi vidi tiun specon de animalo; kiam ŝi malkovris, ke ĝi multaltvaloris, ke ĝi ekscitis la envion de tiuj uloj, ŝi ekmarĉandis, ekdiskutis groŝon post groŝo, flamigante ilin per la kriplaĵoj de sia infano, plialtigante siajn prezojn kun tenaceco de kamparano.

Por ne esti ŝtelita, ŝi skribe kontraktis kun ili. Kaj krome, tiuj ĉi sin devigis pagi al ŝi kvarcent frankojn ĉiujare, kvazaŭ ili luprenus tiun beston en servado.

Tiu neesperita gajno frenezigis la patrinon, kaj la deziro naskigi alian fenomenulon ne plu forlasis ŝin, por fari al ŝi rentojn, kiel burĝino. Ĉar ŝi estis fekunda, ŝi ŝukcesis laŭ sia volo, kaj, laŭdire, ŝi fariĝis lerta variigi la formojn de siaj monstroj, depende de la premoj, kiujn ŝi suferigis al ili, dum la tempo de sia gravedeco.

Ŝi naskis longajn kaj mallongajn, iujn samajn al kraboj, aliajn similajn al lacertoj. Pluraj mortiĝis; ŝi bedaŭris.

La justico provis interveni, sed nenion oni povis pruvi. Oni do lasis ŝin trankvile fabriki siajn fenomenulojn.

Nuntempe, ŝi havas dek unu bone vivantajn monstrojn, kiuj meznombre enspezigas al ŝi, de kvin ĝis ses mil frankojn ĉiujare. Unu ne estas ankoraŭ dungita, estas tiu, kiun ŝi ne volis montri al ni. Sed ŝi ne longe gardos ĝin, ĉar nun ŝi estas konata de ĉiuj bazaruloj de la mondo, kiuj de tempo al tempo venas vidi, ĉu ŝi havas novan estaĵon.

Ŝi aranĝas eĉ aŭkciajn proponojn inter ili, kiam la estaĵo estas inda je.

Mia amiko silentis. Profunda abomeno naŭzis min, kaj tumulto kolero, bedaŭro

invadis min, pro ke mi ne strangolis tiun krudulinon, kiam ŝi estis ĉemanmane.

Mi demandis:

– Kiu do estas la patro?

Li respondis:

– Ni ne scias. Li aŭ ili havas certan diskretecon. Li aŭ ili sin kaŝas. Eble ili partigas la profitojn.

Mi ne plu pensis al tiu malproksima aventuro, kiam mi ekvidis, pasintan tagon, sur laŭmoda plaĝo, elegantan, ĉarman, koketan, amatan virinon, ĉirkaŭitan de viroj, kiuj respektis ŝin.

Mi iris sur la strandon, je la brako de amiko, la kuracisto de la banloko. Dek minutoj pliposte, mi ekvidis servistinon, kiu gardis tri infanojn, kiuj sursable sin rulis.

Du etaj lambastonoj kuŝis surtere, kaj tio kortuŝis min. Tiam mi ekrimarkis, ke tiuj tri etaj estaĵoj estis kriplaj, ĝibaj kaj hokaj, forpuŝe malbelaj.

La kuracisto diris al mi:

– Ili estas la idoj de la ĉarma virino, kiun vi ĵus venis renkonti.

Profunda kompato al ŝi kaj al ili, eniris en mian animon. Mi ekkriis:

– Ho la kompatinda patrino! Kiel ŝi povas ankoraŭ ridi!

Mia amiko reparolis:

– Ne kompatu ŝin, mia kara. Estas la malfeliĉaj etuloj, kiuj necesas kompaton. Jen la rezultoj de la talioj, kiuj estas restintaj fajnaj ĝis la lasta tago. Tiuj monstroj estas fabrikitaj per la korseto. Ŝi bone scias, ke per tiu ludo, ŝi riskas sian vivon. Sed ne gravas al ŝi, kondiĉe ke ŝi estu bela, kaj amata.

Kaj mi rememorigis la alian, la kamparulinon, la Diablinon, kiu vendis siajn fenomenulojn.

Je la 12a de junio 1883

Elfrancigis



Noël Lecomte (Francujo)

Rakonto pri Rozoj

Post senlaboreco, paro da geedzoj ekfunkciigis florvendejon nemalproksime de hospitalo. Per la negranda butiko kaj pli-malpli bona vendado de floroj, ili nur povis vivteni sian familion. Ĉar ĝi estis proksime de la hospitalo kaj plejparto de aĉetantoj estis vizitantoj al la hospitalo, la regulaj klientoj estis tre malmultaj.

La viro, kiu kondukis eksterordinare, estis unu el malmultaj viraj aĉetantoj. Li venis aĉeti nur unu ruĝetan rozon en ĉiu tria tago. Ĉiufoje ĉirkaŭ je duono post la naŭa, li alvenis per triciklo ĉe la pordon de la florvendejo kaj, kun bankbiletoj de tri juanoj en la mano, kriis al la interno de la butiko: "Donu al mi ruĝetan rozon, mastro!" Sonas lia voĉo kun iom da laceco.

Ĉiufoje, rigardante la forirantan dorsfiguron de la viro sur la triciklo, la edzino de la butikisto ĉiam diris al tiu, kun envia tono: "Lia edzino certe estas la plej feliĉa virino en la mondo!"

"Kiu scias, al kiu li donacas la floron?" Li replikis tranaze malkontenteme, aŭdinte, kion lia edzino diris.

Dum pli ol unu jaro, dum kiu la florbutiko estis funkciigata, tiu viro ne ĉesis aĉeti florojn tie. Pro lerteco kaj afableco de la edzino, kaj pro modera prezo, la negocado de la butiko pliboniĝis kaj multaj kuracistoj kaj flegistinoj de la apuda hospitato ankaŭ fariĝis ĝiaj oftaj klientoj.

Ĉu en malvarmega vintro aŭ en varmega somero, la viro, triciklante, alvenis al la butiko en ĉiu tria tago kaj kriis al ĝi: "Donu al mi ruĝetan rozon, mastro!" La scivolemo de la geedzoj pliiĝis pri la viro. La edzo iufoje demandis al la viro: "Vi aĉetas tiom da floroj ne por donaci al via edzino, ĉu?" Aŭdinte tion, tiu ĉiam prezentis ridetan kaj lacan mienon kaj,

dirinte nenion, rajdis per triciklo en la direkto al la hospitalo. Aŭskultinte, la viro ĉiam ridis kun ellaciĝo de plena vizaĝo, li parolis nenion kaj pedalante sur triciklo rajdis en la direkto de la hospitalo.

"Kiel? La floroj certe ne estas donacitaj al lia edzino. Mi ne atendas, ke tia triciklanto eĉ sekvas la furoran modon nuntempe!" La edzo montris la mienon, kiu toleris nenian diskutadon. "Eble li vere donacas la florojn al sia edzino!" La edzino ĉiam kovis tiun ideon.

La ĉiujara Valentena Festo ree alvenis. Rozfloroj estis tre facile disvendeblaj. Kvankam la prezo de rozfloroj altiĝis kelkoble ol en ordinara tempo, la paro tamen estis tro okupitaj, ke ili havis tempon por vespermanĝi. Preskaŭ ĝis la 11-a horo nokte, aĉetantoj de floroj ankoraŭ alvenis flue. Pakante la florojn, ŝi ĵetadis sian rigardon eksteren de la pordo de tempo al tempo. Sciante, kiun la edzino atendas, la edzo naskis strangan senton en la koro.

Tiu viro finfine aperis. Ĉiufoje, anstataŭ atendi ekstere, li iris en la florvendejon kaj kriis: "Mastro, paku por mi 11 rozojn, ankoraŭ ruĝetajn!"

"220 juanoj!" La mastro senpripense donis la prezon. Aŭdinte tion, la viro iom hezitis kaj demandis: "Ĉu vi povas iom malaltigi la prezon?"

La mastro malvarme respondis, "Kia tago estas hodiaŭ? Valentena Tago nur unufoje en jaro!" Do vi turnu vin al aliaj florvendejoj pri la prezo." Senparole, mallevente la kapon, la viro elprenis monon el la malnova nigra monujo: "Majstro, bedaŭrinde, mi...mi... havas nur 200 juanojn. Ĉu mi povus doni al vi la saldon morgaŭ?" La vizaĝo de la viro ruĝiĝis sub la lampo. Apenaŭ la mastro volis ekparoli, lia edzino diris la unua: "Malnova kliento ĝuas favoran prezon. Do, donu al mi 180 juanojn!" La butikisto montris sian malĝojon sur la vizaĝo pro tiuj vortoj de sia

edzino. “Dankon, dankon al butikistino!” La viro tiris el sia monujo plenmanon da monoj, inter kiuj troviĝis nur unu-juan-moneroj, kvin-juan-biletoj kaj dek-juan-biletoj, escepte de monbiletoj kun pli granda valoro, kia kvindek-juan-biletoj. Eĉ sen nombri ilin amasigitajn sur la vendotablo, ŝi tuj metis ilin en tirkeston. Ŝia edzo malkontente demandis: “Kial vi ne nombris?” Anstataŭ respondi al li, ŝi plej rapide faris bukedon da plej belaj rozfloroj. La aĉetanto prenis la bukedon kaj ripetade diris dankojn. Kun floroj en brakumo, li hasteme iris eksteren kaj kunpuŝiĝis kun eniranta flegistino. Vidinte lin, la flegistino, kun granda ekscitiĝo, diris, “Rapide, rapide iru! Via edzino povas ekparoli.” La viro aŭskultis, pedalante sur triciklo, fluge al la hospitalo sin antaŭenjetis.

“Kiom da rozoj vi ankoraŭ havas? Ni aĉetu ĉiom!” kriis vigle la flegistino. “Kial vi volas tiom da rozoj?” La butikistino tre strange demandis. “Sciu, ke tiu virino finfine rekonsciiĝis. Jam dum pli ol unu jaro ŝi restis senkonscia kaj nun ŝi venas al sia konscio. La forto de amo estas tre granda! Gajmiene la flegistino urĝis butikistinon paki florojn. “Kio do okazis?” demandis scivole la viro staranta flanke.

Antaŭ unu jaro, kiam la paro geedziĝis ankoraŭ malpli ol duonjaron, trafika akcidento faris la edzinon vegetaleca homo, sed la ŝoforo, kiu kaŭzis la akcidenton, senspure malaperis kune kun la veturilo en densa nebulo. Por serĉi tiun aŭton, kiu kaŭzis akcidenton, la edzo forlasis sian antaŭan decan laboron kaj pedalis sur triciklo. Tage, farante transportadon tra stratoj kaj stratetoj por sin vivteni, li donis atenton al la aŭto, kiu kaŭzis akcidenton, dum li iris al la hospitalo prizorgi sian edzinon nokte. Pro tio, ke medikamentoj ne efikis sur la edzino sur la lito, li utiligis la rimedon meti la aĵojn ŝatatajn de ŝi antaŭ ŝiaj okuloj por eksciti ŝian nervan sistemon, tiel ke ŝi povus reakiri sian memoron. Kvankaŭ tia

ebleco de sukceso eĉ estis malpli ol la dekmilono, tamen la viro kredis de la komenco ĝis la fino, ke la edzino revenos al sia konscio estonte. La edzino plej ŝatis ruĝtajn rozojn. La viro do aĉetis tiajn rozojn kaj esperis, ke aperu miraklo. Por doni urĝan savon al sia edzino, la viro jam malŝparis sian tutan riĉaĵon kaj ruinigis sian familion, kaj krome li ankaŭ prunteprenis multe da mono. La mono, kiu li perlaboris per tricikla transportado, eĉ ne sufiĉis por la kostoj de ŝia kuracado... Antaŭ la finiĝo de la rakontado de la flegistino, la vilaĝo de la butikistino jam baniĝis en larmoj, kaj ŝia edzo silente fumis cigaredon flanke. Tiun matenon, kiam la virino elhospitaliĝis, oni trovis la triciklon ornamita per ruĝetaj rozoj naŭcent naŭdek naŭ, nek pli nek malpli. La triciklisto ne sciis, de kie tiuj floroj venis, ĉar lia triciklo estis parkita en remizo de la hospitalo dumnokte.



Elĉinigiĝis



Lin Leming (Ĉinujo)

el tagjurnalo *Xinmin Wanbao*



Eldonas Redakcio de *Penseo*
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
 Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
 de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
 Chongqing, 400020, Ĉinio
 Tel: (023) 67095890 (hejme)
 Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

